



**Pozitiva spezokonto  
en Vatikano**


**Imponaj pentraĵoj  
de Canaletto**

**Turismo  
en Ŝangrilao**

# Aperis du noveloj de la afrika aŭtoro Jean Codjo:



**La paŝo senelirejen:** La unua verko de Jean Codjo, kiu rakontas la unuan kontakton de sia vilaĝo kun la okcidentaj kulturigontoj ... Neteoria trakto, tamen tre inspira!



**Dialogo inter surduloj:** Dua verko de la benina aŭtoro, pri la malfacileco de komunikado inter kulturoj. Civilizita nigra blankulo prelegas, sub la baobabo, al siaj samtribanoj. Ili aŭskultas sed ne aŭdas ...

**Prezo: po 6 eŭroj + afranko.**

**Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendisto.**

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) - [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

## La mallonga politika kariero de Hortensia Kvinke

La protagonisto de tiu raporto ne nomiĝas Hortensia, sed, por konservi ŝian anonimecon, la aŭtoro prunteprenas la nomon de la edzino de lia fikcia amiko Kvinke. Tamen ĉi tiu raporto estas aŭtentika. Tio, kion la artikolo rakontas, vere okazis: ne en la Mirlando de Alico, sed en Irlando, la Verda Insulo.

## Favore al turismo

La malgranda ĉina gubernio Zhongdian ĉiujare altiras milionojn da turistoj. Tiu granda interesiĝo ekestis rezulte de la deklaro de la loka registaro en 1997, ke la fikcia loko Ŝangrilao, unuafoje menciita en la romano Perdita horizonto de la brita aŭtoro James Hilton, troviĝas en la gubernio.



SIMON LAW

## Spezokonto por la jaro 2006 pozitiva


Fermiĝis kun pluso, por la tria sinsekva jaro, la spezo-konto de la Sankta Seĝo (la formala nomo de Vatikano). Enspezoj atingis 227,8 milionojn da eŭroj, elspezoj 225,4 milionojn, kaj restis saldo de 2,4 milionoj da eŭroj. Tion sciigis kardinalo Sergio Sebastiani, la prezidanto de la Prefektejo pri la ekonomiaj aferoj, dum la gazetara konferenco, kunvokita por pliklarigi la ciferojn.



STEFANO GIORNANO

## Canaletto: Imponaj pentraĵoj de eŭropaj urbvidaĵoj

Per la organizo de pentraj-ekspozicio de la italo Bernardo Bellotto (ĉ. 1721-1780), iufoje nomata Canaletto, la Arthistoria Muzeo en Vieno plenumis sian multjaran deziron ebligi la aliron de vasta publiko al la artaĵoj de tiu fama pentristo, kiu en ili eternigis vidindajn lokojn de vico da eŭropaj urboj.



8

### POLITIKO

**Irlando**..... 8

La mallonga politika kariero de Hortensia Kvinke

**Albanio** ..... 10

Reputacio ĉe la limo

Kiam ministro fariĝis eksa

### MODERNA VIVO

**Japanio** ..... 11

Busoj, biciklantoj kaj kavaliraj kutimoj

**Litovio** ..... 13

Spartana sorto

Spirraba rekordo

### TURISMO

**Ĉinio**..... 14

Favore al turismo

### EKONOMIO

**Fervojo**..... 16

Projekto por ekonomia vigligo

**Vatikano**..... 17

Spezokonto por la jaro 2006 pozitiva

**Eŭropa Unio** ..... 18

La eŭrobletoj en Belgio

**Albanio** ..... 18

Kiam enmigras mono

### ARTO

**Aŭstrio** ..... 19

Canaletto: Imponaj pentraĵoj de eŭropaj urbvidaĵoj

**Opero** ..... 21

Kantado en la gaela lingvo

### LIBROJ

**La dika Krause? ... kedu min, sinjorino!** ..... 23

### NOVELO

**Tri fuĝantoj** ..... 25

**Abonoj** ..... 4

**Enkonduko** ..... 5

**Leteroj** ..... 6

**El mia vidpunkto** ..... 7

**Anoncetoj** ..... 27

19

Vizitu  
www.**Monato**.net  
kun novaj kontribuoj ĉiutage!

Senpagan pasporton por viziti la paĝojn  
vi petu de [monato@monato.net](mailto:monato@monato.net).  
Menciu vian FEL-kodon, kiun vi  
trovos supre sur la adreŝilpo.

# Kiel pagi vian abonon de MONATO?

## ► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratis je **belga** banko en **eŭroj**. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

## ► Tarifo

| Ŝtato de la paganto |     | MONATO  |      | La Jaro aere   |      |
|---------------------|-----|---------|------|----------------|------|
|                     |     | surface | aere | 1 fojon monate | tuj  |
| Argentino           | EUR | 23      | 26   | 5              | 9    |
| Aŭstralio           | AUD | 82      | 90   | 9              | 17   |
| Aŭstrio             | EUR | 46      | 50   | 5              | 9    |
| Belgio              | EUR | 46      | 56   | 5              | 9    |
| Brazilo             | EUR | 23      | 26   | 5              | 9    |
| Britio              | GBP | 32      | 35   | 4              | 6,5  |
| Bulgario            | EUR | 23      | 26   | 5              | 9    |
| Ĉeĥio               | EUR | 30      | 34   | 5              | 9    |
| Danio               | DKK | 345     | 375  | 40             | 70   |
| Estonio             | EUR | 23      | 26   | 5              | 9    |
| Finnlando           | EUR | 46      | 50   | 5              | 9    |
| Francio             | EUR | 46      | 50   | 5              | 9    |
| Germanio            | EUR | 46      | 50   | 5              | 9    |
| Germanio orienta    | EUR | 41      | 45   | 5              | 9    |
| Grekio              | EUR | 41      | 45   | 5              | 9    |
| Hispanio            | EUR | 41      | 45   | 5              | 9    |
| Honkongo            | EUR | 41      | 45   | 5              | 9    |
| Hungario            | EUR | 23      | 26   | 5              | 9    |
| Irlando             | EUR | 46      | 50   | 5              | 9    |
| Islando             | EUR | 46      | 50   | 5              | 9    |
| Israelo             | EUR | 41      | 45   | 5              | 9    |
| Italio              | EUR | 46      | 50   | 5              | 9    |
| Japanio             | JPY | 6900    | 7300 | 860            | 1260 |
| Kanado              | CAD | 73      | 78   | 9              | 15   |
| Kipro               | EUR | 30      | 34   | 5              | 9    |
| Koreio              | EUR | 41      | 45   | 5              | 9    |
| Kroatio             | EUR | 23      | 26   | 5              | 9    |
| Latvio              | EUR | 23      | 26   | 5              | 9    |
| Litovio             | EUR | 23      | 26   | 5              | 9    |
| Luksemburgo         | EUR | 46      | 50   | 5              | 9    |
| Malto               | EUR | 30      | 34   | 5              | 9    |
| Nederlando          | EUR | 46      | 50   | 5              | 9    |
| Norvegio            | NOK | 390     | 430  | 45             | 71   |
| Nov-Zelando         | NZD | 93      | 99   | 9              | 18   |
| Pollando            | PLZ | 99      | 110  | 22             | 36   |
| Portugalo           | EUR | 37      | 41   | 5              | 9    |
| Rusio               | EUR | 23      | 26   | 5              | 9    |
| Singapuro           | EUR | 41      | 45   | 5              | 10   |
| Slovakio            | EUR | 23      | 26   | 5              | 9    |
| Slovenio            | EUR | 30      | 34   | 5              | 9    |
| Sud-Afriko          | EUR | 41      | 46   | 5              | 10   |
| Svedio              | SEK | 430     | 465  | 49             | 84   |
| Svislando           | CHF | 74      | 81   | 9              | 14   |
| Tajvano             | EUR | 41      | 45   | 5              | 9    |
| Usono               | USD | 61      | 65   | 8              | 13   |
| Baza tarifo         | EUR | 46      | 50   | 5              | 9    |

Prezo de la retaj versioj (askia, unikoda aŭ PDF): 60% de la surfaca tarifo.

## ► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelsö, 5 Craighenhill Road, Kincadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel. 01555 759 166. Reto: davekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
  - **Hilde** Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
  - **Literatura-Servo "Espero"**, Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo.ESPERO@t-online.de.
  - **Hans** Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
  - **Wolfgang** Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japania:** Japania Esperanto-Instituto, Wa-

- sedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miamiau1@ice.co.cr
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiusl@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper\_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
  - **Halina** R. Gorecka, RUS-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
  - **Mikaelo** Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
  - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
  - **Esperanto-Skolan**, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
  - **Sveda Esperanto-Federacio**, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
  - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleeodorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch\_scheidegger@bluewin.ch.
  - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

**MONATO**, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 28a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendo ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

*Verantw. uitgever:* Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

## eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopio: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

## ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.  
Rete: chefredaktoro@monato.net.

## reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Shlafer.

## redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

## grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

## redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Noto:** Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciante. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net..
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna\_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14<sup>th</sup> St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita\_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Sherco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco\_kaj\_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

# Veter-bilanco



En la maja numero mi rezonis pri la klimatŝanĝiĝo kaj eventualaj sekvoj por mi persone en nia mez-eŭropa regiono (MONATO 2007-5, p. 7). Inter alie mi timis, ke abeloj vekiĝos tro frue el vintra dormo, ne trovus nutraĵon kaj sekve mortos. Pro tio – sekva timo – ili ne fekundigos nian pomarbon, tiel ke ni ne kolektos fruktojn. Alia timo estis, ke abundos plagaj insektoj. Nun, en la eŭropa aŭtuno, estas tempo, por fari bilancon. Kaj jen, ĝi estas ne tiom negativa, kiom mi timis. Ekzemple ni havis ĉi-jare nenian plagon de vespoj kaj kuloj. Jes, jen kaj jen aperis insektoj, kiujn ni neniam antaŭe vidis aŭ eble konis nur el mediteraneaj landoj, sed ili ne multis. Abeloj eksvarmis ĝustatempe kaj trovis abunde nektaron; nia pomujo estis plenplena de floroj kaj en aŭtuno havis tiom da fruktoj, kiom neniam antaŭe, tiel ke pluraj branĉoj rompiĝis pro la pezo. Ni ankaŭ ne devis (alia mia tiama timo) terure ŝviti dum la tuta jaro.

Certe, la prognozoj pri la klimat-ŝanĝo estis trafaj: preskaŭ ĉiun monaton meteologoj informis pri rekordaj temperaturoj („plej varma marto depost ... iu jaro”). Ni havis varmegajn, sekajn periodojn, sed ankaŭ pluvo-plenajn periodojn kun agrablaj temperaturoj. Vero estas ankaŭ, ke veter-fenomenoj estis pli ekstremaj ol antaŭ jardekoj. Precipe oftigis pluvegoj, por kiuj germanaj meteologoj inventis novan nocion „*Starkregen*” ([*starkregen*] = forta pluvo), oftigis ŝtormoj kaj fulmotondroj dum monatoj, kiuj antaŭe havis stabilan veteron. Tamen preskaŭ estis nur lokaj inundoj kaj ne tutregionaj, kiel oni timis antaŭe. Kaj aliflanke estis mirige, kiom ŝanĝiĝis la libera naturo. Tie aperis abunde plantoj kaj floroj, kiujn parte mi memoris nur el mia junaĝo kaj kiujn intertempe estis sufokinta nia civilizacio. Pro la tre varma vetero kun sufiĉe da pluvakvo ili krome kreskis gigante. Sed en meza Eŭropo ni ne suferis pro troa varmego kiel en sudo de la kontinento, kie forbruliĝis tre vastaj arb-areoj.

Kion do konkludi el tiu miksita bilanco? Certe ni povas ĝoji, ke la klimatŝanĝiĝo alportas ankaŭ agrablajn sekvojn, almenaŭ por meza Eŭropo. Sed ĉu pro tio ni povas esti kontentaj aŭ eĉ aserti, ke la klimatŝanĝiĝo ne estas tiom danĝera, kiom oni asertas, ke simple la vetero kapricas kiel ĉiam? Tio sendube estus tro naŭva konkludo.

Sincere via

Stefan MAUL

## La tri turoj de MKC (5)

Ĉu Ian Fantom (MONATO 2007/4, p. 24-26) ŝerce mokis la legantaron? Kiu vere estas la mistera „fantomo”, kiu komisie verkis la eseon sub la temtitolo *La nova monda ordo*? Tiu esprimo estis moto uzata de la respublikana partio de prezidanto Bush (patro), kiam li kampanjis por tiu posteno.

Ĉu la „fantomo” aludas, ke ia sekreta enlanda societo detruis la ĝemelajn turojn kaj trabatis la muron de Pentagono per la kvara pirata aviadilo? Laŭ mia memoro la terorisma ago estis farita plejparte de civitanoj de Saŭda Arabio. Kvankam Bush (filo) intime amikiĝas kun la reganta nobelaro de tiu lando, estas dubinde, ke ia enlanda konspiro ekzistas.

Ankaŭ estas ekstreme dubinde, ke la fama adiaŭa avertparolo pri „militindustria komplekso” de la forpasinta Dwight Eisenhower iel rilatas al la nuntempa krizo pri terorisma agado en Irako aŭ en iu ajn alia lando. Konspiraj teorioj estas popularaj, sed ankaŭ ŝajnas al mi senbaze rilatigi la politikan murdon de John Kennedy al la nunaj „internaciaj aferoj” en la regiono mez-orienta. Kian signifon en tiu ĉi eseo havas la bildo pri la usona militprizono en Kubo?

Mi ne estas inĝeniero kaj ne povas klarigi, kiel la ĝemelaj turoj dispeciĝis en tiu 11a tago de septembro. Tamen ankaŭ Ian Fantom ne prezentis pli fortan argu-

menton por klarigi, kiel la konstruaĵoj estis detruitaj.

Mi konsentas, ke la administracio de Bush mensogas pri la stato de internaciaj aferoj. La usona registaro, kiel ĉefredaktoro Stefan Maul prave diris, respondecas pri la morto de miloj da personoj en Irako. Sed malhonesta registaro ne estas kialo por malhonesta ĵurnala raportado! Kiu vere estas la fantomo?

Elson B. SNOW

Usono

## De la morto al la senmorteco

Mi tre ĝojas legi pri inda, videbla montrito de honoro al la memoro de Janusz Korczak en ofte vizitata parto de Varsovio (MONATO 2007/8-9, p. 16-17).

Pasintjare mi trafis – kaj tuj aĉetis – bengallingvan romanon de Narayan Sanyal, konata verkanto de biografiaj romanoj. Tiu ĉi lia romano portas la sanskritan titolon „*Mritjor ma amritam ...*” (De la morto al la senmorteco ...), citon el antikva preĝo, kaj kunplektas erojn el la vivoj de Janusz Korczak, Anne Frank kaj Simon Wiesenthal. Sendube por plividebligi la eventojn al la bengala legantaro, Sanyal reliefigas la fakton, ke ĝuste antaŭ la forpaso Korczak aranĝis en sia orfejo surscenigon de la teatraĵo *La poŝtoficejo* de Rabindranath Tagor. Tiu teatraĵo, kiu donas la kuraĝon alfronti la morton kaj kompreni, ke la homo estas

pli granda ol lia perejo, ekzistas ankaŭ en Esperanto. Ĝi aperis en *Literatura mondo* en la intermilita periodo; elbengalis ĝin Provat Kumar Bose.

Mi ĝojas povi diri, ke ankaŭ en tiu ĉi mondparto ne estas nekonata la vizaĝo de Janusz Korczak, kiu aperas sur la romankovrilo kun maljunula rideto, ĉirkaŭata de infane ridetantaj vizaĝoj de georfoj.

Probal DASGUPTA

Barato

## Pontoj de amikeco

En la artikolo *Duonkore donata* (MONATO, 2007/5, p. 11) oni citas la planon de Martti Ahtisaari pri la statuso de Kosovo. Anstataŭ tio, ke la traktadoj inter Beogrado kaj Prištino baziĝu sur internacia juro, Ahtisaari surprize konkludis, ke interkonsento inter ili du ne ekzistas, kaj li proponas novan statuson de Kosovo.

Balkano kaj Eŭropo devus flegi la ideon, ke naciaj malplimultoj estas pontoj de amikeco inter ŝtatoj kaj popoloj. Tial la albana malplimulto en Serbio rezignu pri kreado de nova ŝtato en ekzistanta Serbio kaj komencu la flegadon de amikeco inter Albanio kaj Serbio.

Atanasije MARJANOVIĆ

Serbio

## Casals hispanigita (2)

Ferriol Macip i Bonet (MONATO 2007/7, p. 6) pravas, kaj mi pardonpetas. La granda komponisto-violonĉelisto Casals estis efektive kataluno kaj nomiĝis Pau. Mi eraris, kiel ĉiuj de mi konataj enciklopedioj, muziktekstoj, diskoj, muzikistoj, kiuj ĉiuj senescepte parolas pri „hispana violonĉelisto” kaj hispanigas lian nomon je „Pablo”. Eble la eraro devenas de la fakto, ke Katalunio estis/as konsiderata „regiono” de la hispana ŝtato. Io simila okazis al Zamenhof, iam konsiderata kaj eĉ iafoje sin deklarinta rusa civitano (= ŝtatano), ĉar tiutempe Pollando estis laŭjure „rusa provinco”. Mi dankas sinjoron Ferriol. Ekde nun mi ĉiam subtrekos la apartenon de Casals al la kataluna etno, kiun mi aparte ŝatas kaj estimas.

Filippo FRANCESCHI

Italio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al [leteroj@monato.net](mailto:leteroj@monato.net) aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



# Malfavore fervoje

de Paul GUBBINS

**C**i-jare mi multe aviadadas. Multe pli ol en pasintaj jaroj. Fakte, mi rondiras la terglobon: el Eŭropo unue al Usono, poste al Japanio, tiam hejmen al Eŭropo. Kaj, antaŭ la rondirado, mi samjare jam flugis de Britio al Italio.

Kiom da mejloj mi estos ĉi-jare fluginta, mi ne scias. Mi ne kalkulis kaj, verdire, mi ne volas kalkuli. Mi scias nur, ke, de medioprotekta vidpunkto, mi tro aviadadas. Alivorte, mia ĉi-jara tiel nomata karbona piedsigno estos hontinde granda. Eĉ ne pacigas mian konsciencon la fakto, ke mi poluas pro Esperanto: ĉiuj ĉi-jaraj flugoj estos faritaj per, pro kaj por Esperanto.

Do, kiam mi akceptis inviton reiri en malfrua somero denove al Italio (ankoraŭfoje pro Esperanto), mi decidis fari mian plejblon por savi la planedon kaj tien trajni. Per Interreto mi ek esploris kaj, post iom da tempo, trovis, ke eblas vojaĝi ene de 24 horoj de mia hejmo en norda Anglio al mia celo en norda Italio.

## Suplemento

Eblas aĉeti kvin-tagan rabat-bileton kontraŭ 275 eŭroj. Bone, sed la bileto ne validas en Britio. Necesus aĉeti kroman bileton por atingi minimume Londonon (fakte, ne klaris, ĉu la rabat-bileto validus en *Eurostar* inter Londono kaj Parizo). Do al la 275 eŭroj neprus aldoni minimume pliajn 80 eŭrojn. Cetere estu alkalkulita suplemento por kuŝloko en nokta trajno el Parizo (jam de jardekoj ne plu studento, mi ne pretas dumnokte sidadi en kutima kupeo).

Ĝis nun, post esplorado de pluraj retejoj, ĉio ĉi tolereblas. Tamen jen tubero. Eblas mendi nur ses semajnojn antaŭ la

vojaĝo. Ĝis tiam, laŭ la retejoj, la trajnhoraroj ne haveblas. Do kion fari? Ses semajnojn antaŭ la planata Italio-vojaĝo mi estos survoje al Japanio – sen propra komputilo kaj sen aliro al Interreto. Se mi atendus ĝis mia reveno, eble estus tro malfrue por akiri biletojn ... almenaŭ rabatitajn.

Estante senkuraĝulo, mi ne volas riski. Do mi denove guglas, serĉante flugbiletojn por la koncernaj datoj. Post sekundoj jen ĉio: flugkompanioj, horaroj, prezoj ktp. Ho ... la prezoj. Anstataŭ minimume 350 eŭroj, mi trovas konvenan flugon kontraŭ 175 eŭroj. El mia loka flughaveno rekte tien, kien mi volas iri, kontraŭ duono de la kosto de la trajnbileto. Mi tuj mendis.

## Klientoplaĉaj agentoj

Amikoj poste diris, ke estas apartaj retejoj, kiuj specialistiĝas pri eŭropaj trajnvojaĝoj, ke estas agentejo en Londono, kiu povas konsili kaj mem mendi

biletojn. Bone ... sed la retejojn mi ne trovis, kaj en Londono mi ne loĝas. Kaj, se ne eblas mendi ĝis ses semajnojn antaŭ la vojaĝo, la plej informriĉaj retejoj, la plej klientoplaĉaj agentoj ne multe utilos. Kredeble – espereble – la situacio ekster Britio estas pli bona: mi ne scias.

Tamen ĝis la trajnkompanioj provizos la saman, tujan Interret-servon kiel la flugkompanioj, ordinaruloj kiel mi, eĉ tiuj, kiuj volas fliki siajn konsciencojn, se ne la medion, kiun ili mistraktis, elektos aviadilon kaj ne trajnon. Ne temas simple pri kosto. Mi pretas pagi pli por trajni, kaj malpli polui: feliĉe, estante almenaŭ monhaveta, mi povas toleri la kroman elspezon. Tio, tamen, kion mi ne toleras, estas la ĝenoj, la informo-truoj, la atendado ... resume, la amatoreco de la trajnkompanioj.

Kaj, ĝis la kompanioj kunlaboros, ĝis mi povos de mia hejma komputilo mendi kontraŭ deca prezo decan trajnbileton al eŭropa celtacio, mia karbona piedsigno – bedaŭrinde – eĉ pli grandiĝos. ■

CHRIS McKENNA



# La mallonga politika kariero de Hortensia Kvinke



RICHARD MASONER

la oficejo de la elektoregistristo en najbara urbo. Ĉar nek ŝi, nek mi posedas motoran veturilon (es-tante ambaŭ konvinkitaj medio-amikoj), ŝi petis la menciitan fondinton de la partio, kiu posedis etan verdan aŭtomobilon, ke li fariĝu ŝia elektoagento kaj ke li veturigu ŝin al la registrejo.

## Bezonataj detaloj

Ĉar la decido nomumi ŝin estis farita malfrue, ŝi alvenis preskaŭ je la lasta momento permesita por registriĝi. La registristo, afabla iom maljuna viro, komencis enskribi la bezonatajn detalojn pri la pretendanta kandidatino. Dum la burokrata procedo okazis la sekva konversacio:

Hortensia: Mi legis en la regularo pri tutlandaj elektoj, ke ĉiuj kandidatoj devas esti irlandaj civitanoj. Kio estas la oficiala difino de la termino „civitano“?

Registristo: Ho, pri tio oni neniam min demandis. Verdire, mi ne scias, sed mi provos ekscii.

**M**ia kara edzino ne nomiĝas Hortensia, sed, por konservi ŝian anonimecon, mi prunteprenas la nomon de la edzino de mia fikcia amiko Kvinke. Tamen ĉi tiu raporto estas aŭtentika. Tio, kion mi rakontas, vere okazis: ne en la Mirlando de Alico, sed en Irlando, la Verda Insulo.

Verda ankaŭ estas Hortensia, aŭ, por precizigi, ŝi estas membro de la irlanda Verda Partio, antaŭe nomita la Ekologia Partio (fondita, parenteze, de respektata esperantisto, onklo de eksredaktoro de alia konata esperantlingva revuo).

Antaŭ kelkaj jaroj, dum la lasta elektokampanjo por la Dáil [dojl], la malsupra ĉambro de la parlamento de Irlando, la verduloj persvadis Hortensian kandidatiĝi en nia elektodistrikto. Laŭleĝe, ŝi devis prezenti sin ĉe

*Sidejo de la irlanda registaro en Dublino*



RICH WATTS

Post kelkaj pliaj demandoj al la kandidatino kaj telefonado al la ĉefurbo daŭris la konversacio.

Registristo: Mi ege bedaŭras, sed vi ne estas civitano de Irlando. Se vi ne estus farinta demandon pri civitaneco, mi jam registrus vin. Sed atendu. Ni klopodos igi vin civitano antaŭ vendredo.

La komplezema registristo telefonis al la instanco en Dublino, kiu respondecis pri civitaneco. Tamen venis la informo, ke antaŭ la semajnfino ne eblas. Oni bezonas pli da tempo por igi ŝin ŝtatanino de Irlando. Do ŝi ne povos kandidatiĝi. Hortensia tiam ricevis inspiron.

Hortensia: Se mi ne povas esti registrita kiel kandidato, ĉu mia kunulo, s-ro KoFo rajtas? Li posedas irlandan ŝtatancon.

Registristo: Certe.

Hortensia: Ĉu ankaŭ la agento de la kandidato devas esti irlanda civitano?

Registristo: Tute ne.

Hortensia: Do, ni ŝanĝu niajn rolojn. Li estu la kandidato, kaj mi la agento.

Do s-ro KoFo akceptis la novan rolon, kondiĉe, ke li ne vizitu domojn en la elektodistrikto, nek metu afiŝojn, nek dissendu aŭ disdonu flugfoliojn, nek faru publikajn oratoraĵojn. Tamen, eĉ sen tia varbado, li sukcesis gajni pli da voĉoj ol aliaj kandidatoj, krom tiuj de la grandaj partioj.

## Plendoj kaj zorgoj

Ĉi-jare denove devis okazi elekton por la irlanda parlamento. Intertempe Hortensia sukcesis aldoni irlandan civitancon al sia antaŭa denaska ŝtataneco, do rajtis kandidatiĝi. Ŝi tuj komencis sian elektokampanjon, kvankam modestan kompare kun aliaj kandidatoj. Mankis mono por personaj afiŝoj kaj flugfolioj. Ŝi vizitis diversajn urbojn kaj vilaĝojn en la elektodistrikto kaj aŭskultis la plendojn kaj la zorgojn de la publiko. Por transporti sin mallongdistance ŝi uzis biciklon (anstataŭ la kamionetojn uzatajn de aliaj kandidatoj) kaj vestis sin per klare videbla flava jako, sur kiu legiĝis la frapfrazo: „Unu aŭtomobilo malpli – kaj pli rapide! Voĉdonu verde – voĉdonu Kvinke!“.

Kelkaj homoj promesis doni al ŝian unuan preferon laŭ la irlanda elektosistemo, sed aliaj – precipe apogantoj kaj kandidatoj de la grandaj partioj – atakis la politikon de la verduloj. Unu asertis, ke la Verda Partio estas la limako sur la laktuko de la socio; alia, ke ĝia politiko regresigos la landan agrikulturon kaj ekonomion al la deknaŭa jarcento.

Iutage Hortensia renkontis sur la strato unu el siaj apogantinoj, N, kiu entuziasme ŝin salutis kaj diris, ke ŝi senpacience atendas la sukceson de la kandidatino, por ke ŝi ricevu novan fridujon. Alia promesis, ke ŝi voĉdonos por Hortensia, kondiĉe, ke ŝi forigu hundofekajojn de la trotuaroj.

Oni konstatis, ke la voĉdonantoj en nia elektodistrikto malmulte interesiĝas pri la medio, pri tutmondiĝo aŭ pri la ekstera politiko de la registaro. La demando de la plimulto vortumiĝas: „Kion vi povos fari por mi?“ Fine Hortensia gajnis iom pli ol naŭ cent voĉojn – ne sufiĉajn por parlamenta seĝo.

## Nova koalicio

Feliĉe, ŝi neniam atendis, nek deziris esti politikistino. Entute la Verda Partio gajnis (aŭ, pli ĝuste, retenis) nur ses seĝojn. La respublikana partio, FF, kiu havis majoritaton en la antaŭa registaro, refoje gajnis, sed ne kun absoluta majoritato, do devis ekintertrakti kun aliaj partioj kaj sendependuloj por formi novan koalicion. FF invitis la Verdajn Partion partopreni, kaj ĝia estraro akceptis kontraŭ la volo de multaj el ĝiaj membroj.

Reprezentantoj de ambaŭ partioj konsentis pri longa kompromisa programo. La programo estis prezentata al kunveno en Dublino, al kiu estis invititaj ĉiuj anoj de la Verda Partio. Ili devis voĉdoni, ĉu eniri koalicion kun FF aŭ ne. La debato estis fervora, kelkfoje fajra, sed disciplinita kaj demokrata. Unu ano deklaris: „Nia partio nepre ne devas eniri koalicion kun mensogantoj kaj trompantoj“. Li kredeble aludis al la fakto, ke dum jaroj pluraj FF-politikistoj, inkluzive de diversaj ŝtataj ministroj, estis implikitaj en gravaj skandaloj kaj devis aperi antaŭ tribunaloj, kiuj ankoraŭ ne finis siajn esplorojn.



Patricia McKenna

## Torturejoj

Verda eksmembro de la Eŭropa Parlamento Patricia McKenna emociie postulis, ke la partio ne partoprenu en registaro, kiu permesas al la usona flugarmeo uzi la internacian flughavenon en Shannon [ŝanon] (okcidenta Irlando) por replenigi la benzinujojn de militaj aviadiloj survoje al Irako kaj Afganio, eble transportantaj militajn malliberulojn al Gvantanamo kaj/aŭ al sekretaj malliberejoj kaj torturejoj en aliaj landoj.

Hortensia kaj aliaj ĉeestantaj anoj de ŝia loka elektodistrikta grupo voĉdonis kontraŭ partopreno en la koalicio, sed majoritato apogis la proponon. La Verda Partio nun estas malplimulta partnero en la nova mikspota parlamenta koalicio konsistanta el 78 FF-anoj, 6 verduloj, 4 sendependuloj, 2 membroj de PD (dekstrala ĉionprivatiga partio). La opozicio konsistas el FG (politike simila al FF), la Laborista Partio kaj kelkaj sendependuloj. Sekve, pluraj membroj ekŝiĝis el la Verda Partio, do ĝia estonteco kaj tiu de la koalicio estas necerta.

Hortensia decidis ne plu okupiĝi pri partia politiko. Ŝi plu kulturos sian ĝardenon, kunlaboros kun *Amnestio Internacia*, studos por ekologia diplomo, praktikos la hispanan kaj la irlandan lingvojn, ĉeestos astronomiajn kunvenojn kaj aranĝojn de la nova naturamanta socio, ludos pianon, manĝigos la katinon, kaj faros sian eblon por konsciigi la publikon pri la neceso savi la planedon. Per tio ŝi estos pli-malpli plene okupata.

Garvan MAKAJ



REUTERS / YIORGOS KARAHALIS

ALBANIO

## Reputacio ĉe la limo

**A**ntaŭ nelonge okazis plia alban-greka landlima incidento. Grekaj gardistoj pafis albanan junulon klopodantan kontraŭleĝe transpasi al la ekonomie pli prospera najbara lando. La junulo faris tion, kion centmiloj da albanoj jam faris.

La pafado vekis profundan indignon ne nur en Albanio, sed ankaŭ en Grekio. Okazis surstrataj protestoj organizitaj de asocioj de albanaj enmigrintoj kaj grekaj asocioj por homaj rajtoj. La indignon plifortigis televida

elsendo de sceno en policejo en Ateno, kie policistoj batas du enmigrintajn adoleskajn ŝtelistojn, el kiu unu estas albanio. La policianoj devigas ilin plurfoje manfrapi unu la alian.

La lasta landlima incidento estas unu inter miloj da similaj. Tamen gravas, ke la greka registaro kaj aliaj instancoj reagu pozitive kaj kondamnu la kulpulojn. Tio helpas plibonigi la reputacion de Grekio ene de la Eŭropa Unio.

Bardhyl SELIMI

*Greka policano perfortas manifestacianton.*

ALBANIO

## Kiam ministro fariĝis eksa

**Ĉ**i-jare albanoj memoras sian rolon en la eksigo antaŭ 50 jaroj de la sovetia ministro pri defendado, marŝalo Georgij Ĵukov. En oktobro 1957 la sovetia partigvidanto Nikita Ĥruŝĉov ordonis al Ĵukov viziti Balkanion. Tiel Ĥruŝĉov ellandigis sian ministron por pli facile eksigi lin.

Ĵukov, kiu distingiĝis, defendante en 1941 Leningradon, kaj kiu kvarfoje fariĝis Heroo de Sovetio, prezentis kaj por Stalin en 1946 kaj por Ĥruŝĉov post 1953 potencon rivalon, malgraŭ tio, ke li okupiĝis nur pri la armeo kaj ne pri pli vastaj politikaj aferoj.

La ministro estis pompe kaj gastame ricevata en Albanio la 17an de oktobro 1957. Aranĝitaj estis militludo, bankedoj kaj renkontiĝoj kun altranguloj. La albana parlamento pretigis por Ĵukov la prestiĝan Ordenon de Skanderbeg, la nacia heroo de Albanio.

Dume en Moskvo Ĥruŝĉov planis la eksigon de Ĵukov. Post dek tagoj en Albanio la ministro hejmeniris. El la aviadilo li sendis tradician dank-telegramon al siaj albanaj gastigintoj.



*Georgij Ĵukov ne ricevis la ordenon de Skanderbeg.*

Li subskribis ĝin simple kiel marŝalo Ĵukov, ne ministro. Tiel oni eksciis, ke li estas informita pri sia eksigo. Cetere

la Ordenon de Skanderbeg li ne ricevis.

Bardhyl SELIMI

# Busoj, biciklantoj kaj kavaliraj kutimoj

**P**artoprenintoj en la Universala Kongreso en Jokohamo certe rimarkis, inter multaj ekzotaĵoj, kelkajn strangaĵojn, ekzemple veturadon sur la maldekstra flanko: vagonaroj sur fervojoj, aŭtomobiloj sur aŭtoŝoseoj kaj urbostratoj, eĉ homoj sur trotuaroj kuras maldekstre.

Tiu praktiko estis ĝenerala jam meze de la 19a jarcento, sed oni ne scias kial. Iuj provis eltrovi la kialon tiamaniere: kiam renkontiĝis mezepokaj kavaliroj<sup>1</sup>, ili emis piediri sur la maldekstra flanko. Alie iliaj glavoj portataj maldekstre ĉe la kokso tuŝus unu la alian, minacante esti kaŭzo de kvereloj kaj eĉ dueloj. Estas tamen iom strange, ke en la okcidento oni ne necese iras maldekstre, kvankam oni portas la glavon same maldekstre (oportuna kutimo por la plimulto de homoj, kiuj estas dekstramanaj).

## Heredaĵo

Ekster Japanio troviĝas landoj, kie oni veturas sur la maldekstra flanko: Britio, sed tiu inkluzivas nun sendependajn ekskoloniojn escepte de Kanado, kiu havas pli intimajn rilatojn kun Usono. Japanoj vojaĝantaj eksterlande sentas sin hejme en multaj landoj pro la heredaĵo de la brita imperio.

Japanio havis ŝancon transiri al dekstraflanka veturado. Tio okazis post la dua mondmilito, sed ĝi rezignis pro la neceso refari pordojn de aŭtobusoj. Tio estas tipa logiko de burokratoj ĉe la ministerio pri transporto. Tiam, en la malfruaj 40aj jaroj, aŭtomobiloj estis malmultaj sur tokiaj stratoj pro uso-

naj aeratakoj. Eĉ busoj estis malmultaj. Tiamaniere Japanio fiaskis kapti ŝancon novigi la trafiksystemon.

## Statuso-simboloj

Supozeble partoprenintoj en la UK en Jokohamo trovis japanajn aŭtomobilojn pli puraj ol en sia hejmlando. Japanoj prizorgas siajn veturilojn, malgraŭ tio, ke ili jam estas riĉaj. Por multaj japanoj, aŭtoj estas statuso-simboloj. Semajnfine, en loĝkvartaloj de Tokio, viroj lavas sian aŭtomobilon kun kaŭĉuka akvotubo en la mano. Tio videblas malofte en Usono aŭ ekzemple Parizo. Japanoj fariĝis riĉaj, sed ilia psiĥologio restas tipe etburĝa. ▶

HTTP://JA.WIKIPEDIA.ORG/WIKI/利用法.TOMOMARUSAN写真館



ISAKA YUJI



# Moderna kurso por modernaj homoj per modernaj metodoj

Aperis ĉe FEL nova „Ampleksa baza Esperanto-kurso”, kompakta disko (kodoromo) por Windows 95/98/ME/2000/XP, kun Esperanto-kurso, vortaro kaj vorttrejnilo kaj kun ampleksaj informoj pri la Esperantomovado. Akompanas la lecionojn muzikaj fragmentoj, i.a. de Kajto, Jomo, Persone... ekzemploj el la Esperanto-literaturo, kompleta numero de MONATO, rabatkuponoj por Esperanto-renkontiĝoj, kaj multe pli.

La kurso ekzistas kun kovrilo kaj klarigoj en la lingvoj nederlanda, franca, germana, angla, hispana, itala, portugala, dana, norvega kaj sveda.

Prezo ĉe FEL: **14,96 EUR** + aŭ franko. Distribuantoj ricevas rabaton de 33 % aĉetante tri ekzemplerojn aŭ pli samtempe.

Mendu la kurson (ne forgesante indiki la lingvon) ĉe  
Flandra Esperanto-Ligo,  
Frankrijklei 140,  
B-2000 Antwerpen, Belgio;  
rete: [butikio@fel.esperanto.be](mailto:butikio@fel.esperanto.be)  
[www.retbutikio.net](http://www.retbutikio.net)



► Inter la aĝoj, kiujn japanoj lernis de usonanoj post la dua mondmilito, estas t.n. vid-al-vida trafiko. Kie troviĝas neniu trotuaro, piedirantoj tenu sin sur la dekstra flanko. Tio ŝajnas racia. Sed tiu regulo konfuzas. Tiuj, kiuj havas veturpermeson, facile komprenas la regulon, sed por aliaj, precipe maljunuloj, la regulo estas tro komplika. Estus do pli bone lasi piedirantojn observi malnovan regulon ĉiam piediri sur la maldekstra flanko kaj peti veturigantojn iri dekstre. Tio tamen estas revolucia, kaj universala krom ĉe la britoj.

## Trotuaro

En Japanio la institucio de trotuaro estas nova. Ĝi naskiĝis nur meze de la 19a jarcento. Kio estis ĉiutagaĵo por la antikvaj romianoj estis nekonata en Japanio ĝis la moderna epoko. Eĉ nun ekster grandaj urboj ne troviĝas trotuaroj.

Kio aldonis al konfuzo estas nova regulo, ke bicikloj povas iri sur trotuaro. Tiamaniere trotuaroj ĉesis esti sendanĝeraj. Biciklantoj estis viktimoj sur la veturilspaco. Ili ŝanĝiĝas nun en fortulojn. Ili insultas sur trotuaroj maljunulojn malrapide piedirantajn. La polico devus insisti, ke biciklantoj uzu aŭtozonojn.

Nun estas tempo, ke oni malgrandigu la nombron de aŭtomobiloj. La gvidantoj de la Federacio de Japanaj Entreprenoj neniam konsentos pri tio, kio malpliigus ilian profiton. Se tamen oni ne faros, tuta Japanio estos kovrita de aŭtoŝoseoj. Burokratoj ĉe la ministrejo pri financo kaj ekonomio kaj universitataj profesoroj de ekonomiko neniam konsentos, sed, por la kvalito de vivo, oni devus pensi pri minusa kresko de la ekonomio.

YAMASAKI Seikō

1. Armitaj bienuloj en la antaŭmoderna Japanio ne estis nomataj „kavaliroj”, kvankam ili rajdis ĉevalon. En la japana li estas simple „sinjoro, bienulo”; mi ne nomis ilin feŭdaj, ĉar genealogie ili estis en la antikveco sklavtenantoj.

# Spartana sorto



*Prezidanto Adamkus turmentiĝas sen propra aviadilo.*

**E**stis iom nesukcesa la ŝtata vizito de la litova prezidento Valdas Adamkus al Portugalio. La vesperon antaŭ la vizito ankoraŭ ne estis



*Milita aviadilo Spartan estas nova, tamen ĝi ne taŭgas por ŝtataj vizitoj.*

klare, kiu flugkompanio transportos la prezidenton. Fine Adamkus flugis kiel ordinara pasaĝero – kaj per unudirekta bileto – en ĉeĥa aviadilo.

Litovio ne posedas propran aviadilon por oficialaj vizitoj. Oni intencis tiucele adapti nove akiritan milit-transportilon de la marko *Spartan*. Tamen ministro, reveninte el Centra Azio, plendis, ke *Spartan* tro malvarmis. Oni veturas, laŭ oficistoj de la prezidenta administrejo, kvazaŭ per kamiono kun ŝtata flago.

## Ŝtata ordeno

Adamkus ne estas la sola prezidento, kiu tiel suferis. Antaŭulo, Algir-

das Brazauskas, iam flugis al Argentino. Survoje perdiĝis valizoj, inkluzive de unu, kiu entenis ŝtatan ordenon por la argentina prezidento. Kaj kiam Litovio estis formale akceptota en la Eŭropan Union, la tiama prezidento Rolandas Paksas flugis al Ateno per la litova kompanio *Aurela*. Multaj, vidante diversajn ŝtatajn aviadilojn, demandis: „Kiu estas tiu ĉi lando Aurela?”

Reveninte el Portugalio, Adamkus petis, ke la registaro baldaŭ decidu pri aviadilo por ŝtataj eksterlandaj vizitoj, por ke la prestiĝo de la lando ne plu suferu.

LAST

## Spirraba rekordo

**L**itova iluziisto Arvydas Gaičiūnas kaj lia fratino Diana kreis novajn rekordojn, kiam ili plej longe restis senspire sub akvo. Arvydas pasigis 15 minutojn 58 sekundojn subakve kaj Diana 11 minutojn 7 sekundojn. La antaŭaj rekordoj: respektive 13 minutoj

42 sekundoj kaj 7 minutoj 30 sekundoj.

Post elakviĝo, ĉiun el ili ekzamenis kuracisto. Antaŭ nelonge la paro kreis alian rekordon, kiam ili pasigis pli ol 63 horojn en glacio-dometo.



*Ĉenoj – tiam la ĝenoj de nova monda rekordo.*

LAST

# Favore al turismo

*La neĝkovrita monto Moirig.*

**Z**hongdian [ĝongdjan] estas malgranda gubernio en la nord-okcidenta parto de la ĉina provinco Yunnan [junan], kiu situas najbare de Tibeto. Antaŭe tre malmultaj konis ĝin, sed nun la gubernio ĝuas grandan famon. Ĉiujare ĝi altiras milionojn da

turistoj. Tiu granda interesiĝo ekestis rezulte de la deklaro de la loka registaro en 1997, ke la fikcia loko Ŝangrilao (angle *Shangri-La*), unuafoje menciita en la romano *Perdita horizonto* de la brita aŭtoro James Hilton, troviĝas en la gubernio.

*La templo Songzanlin.*



En 1933 Hilton verkis la libron, en kiu li priskribas belan lokon, en kiu estas longa kaj mallarĝa valo Blua Luno kaj lamaejo Ŝangrilao, situanta sur krutaĵo ĉe la piedo de la neĝkovrita monto Karakal. Laŭ la romano iam en la 30aj jaroj de la pasinta jarcento okazis tumulto en la urbo Baskul en iu lando najbare de Barato. Brita diplomato, lia sekretario, usonano kaj misiistino decidis forlasi la urbon. Ili flugis per malgranda aviadilo al Peshawar [peŝavar], en la nuna Pakistano (tiam parto de la brita kolonio Hindio). Tamen la aviadilo estis kaptita kaj surterigita en dezerta loko. Gvidate de ĉina maljunulo, scipovanta la anglan, ili venis al la lamaejo Ŝangrilao. Ĝi regis la valon Blua Luno, kie loĝis miloj da homoj de pluraj gentoj, apartenantaj al malsamaj religioj. Ili harmonie vivis laŭ la principo de modereco kaj ĝenerale estis longvivuloj. En la lamaejo oni ko-

ODIER MART

La monto Moirig.



SEAN LEE

Instruanta lamao.



La budhisma pagodo.

lektis multajn trezorojn, librojn kaj instrumentojn eksterordinarajn el la orienta kaj okcidenta civilizacioj. Ĉiuj lamaoj estis bone klerigitaj ...

Post dekoj da jaroj en iuj landoj homoj deklaris, ke Ŝangrilao troviĝas sur ilia teritorio: Ladakh de Kaŝmiro, Nepalo, Butano, valo Hunza en Pakistano kaj en sud-okcidenta Ĉinio. En la lasta regiono, pli precize en la gubernio Zhongdian, troveblas neĝmonto, profunda valo kaj lamaejo, menciitaj en la romano *Perdita horizonto*. Tie estas 470 montoj, kiuj altas je pli ol 4000 metroj super la marnivelo. Inter ili kuŝas valoj, stepoj, lagoj, virgaj arbaroj kaj glaciejoj. Pro specifaj situoj kaj klimato tie formiĝis mirindaj vidindaĵoj, konsistantaj el komplika geomorfologia strukturo. Tie estas ankaŭ raraj bestoj kaj plantoj. En la antikveco la gubernio servis kiel grava transŝarĝa stacio ĉe la sud-okcidenta Silka Vojo.




La unua turno de rivero Jangzio.

Nun ĝi havas ĉirkaŭ 130 000 loĝantojn el 13 etnoj kaj el malsamaj religioj. Ĉiu etno trankvile vivas laŭ siaj propraj moroj kaj kutimoj. En 2002 la gubernio Zhongdian transprenis la nomon Ŝangrilao.

Alice Liu

La lago Bita.



# Projekto por ekonomia vigligo

Estroj de ministrejoj pri komunikado de Litovio kaj transporto de Pollando en eta, antaŭe nekonata, litova urbeto Mockava, apud la limo litova-pola, inaŭguris specialan memortabulon. „Tiu ĉi ago simbolas komencon de la projekto *Rail Baltica*”, deklaris ili.



*La ministro pri transporto de Pollando Jerzy Polaczek (maldekstre) kaj la ministro pri komunikado de Litovio Algirdas Butkevičius subskribas interkonsenton pri la fervoja limpunkto.*

**L**itovio, kun najbaraj ŝtatoj Pollando, Latvio kaj Estonio, iniciatis fervojan projekton, kiu povus forte plivigli la ekonomion de la tuta regiono. Notindas, ke Litovio kaj aliaj baltaj landoj nun estas baritaj de la fervoja reto de la Eŭropa Unio. Kiel eksaj sovetiaj landoj ili posedas alidimensian rusan ŝpuron. La distanco inter la

enaj randoj de la relo estas 1524 mm. La eŭrope dimensian fervojon kun ŝpuro de 1435 mm ili perdis en la jaro 1940 kune kun sia ŝtata sendependeco.

Membriĝinte al Eŭropa Unio, la baltaj landoj ekdeziris ankaŭ fervojan integriĝon kaj reakiron de la eŭrope dimensia fervojo. Kiel rezulto de tiu strebo naskiĝis la projekto *Rail*



*Tiu ĉi simbolo memorigos la starton de la projekto Rail Baltica.*



*La eta litova urbeto Mockava situas sur la limo litova-pola.*

*Baltica*. Laŭ tiu projekto eŭrope normata fervojo kunligus Varsovion, tra Litovio kaj Latvio, kun la estona ĉefurbo Talino. La projekton, kies findato estas antaŭvidita por la jaro 2013, realigas Pollando, Litovio, Latvio kaj Estonio. Post finrealigo ĝi transportu kargojn je rapido de 160 km/h kaj pasaĝerojn je 200 km/h. Komence la rusa ŝpuro post la dua litova urbo Kaunas estu modernigata tiel, ke ĝi permesu trajnrapidon de 120 km/h.

La landoj, kiuj lanĉis tiun ĉi fervojan projekton, ne estos kapablaj memstare realigi ĝin. Tial ili petis financan subtenon de la Eŭropa Komisiono. Oni kalkulas, ke nur por fervojaj laboroj en la teritorio de Litovio estos necesaj 800 milionoj da eŭroj.

LAST

# Spezokonto por la jaro 2006 pozitiva

**Fermiĝis kun pluso, por la tria sinsekva jaro, la spezo-konto de la Sankta Seĝo (la formala nomo de Vatikano). Enspezoj atingis 227,8 milionojn da eŭroj, elspezoj 225,4 milionojn, kaj restis saldo de 2,4 milionoj da eŭroj. Tion sciigis kardinalo Sergio Sebastiani, la prezidanto de la Prefektejo pri la ekonomiaj aferoj, dum la gazetara konferenco, kunvokita por pliklarigi la ciferojn.**



STEFANO GIORDANO

**E**n la financa raporto estas enkalkulitaj la kostoj de ĉiuj papaj administracioj (la kurio), de la 118 reprezentaj sidejoj tra la tuta mondo kaj de la naŭ delegitejoj ĉe internaciaj organizaĵoj. Kiel ĉiujare, estis indikitaj la fontoj de la enspezoj.

Rilate tiun lastan temon estis citita kaj komentita la kanono 1271 de la eklezia leĝaro, kiu invitas episkopajn konferencojn, diocezojn, diversspecajn ekleziajn organizaĵojn kaj fidelulojn libere helpi por la subvenciado de la taskoj de la kurio. En la jaro 2006 la tiufontaj monoferoj atingis 126,3 milionojn da eŭroj (iomete pli ol en la antaŭa jaro). Certe tiu sumo ne sufiĉus, se ne helpus alia fonto, la „Obolo de Sankta Petro”, mondonacoj al la papo fare de milionoj da fideluloj el la tuta mondo. La pasintan jaron tiu monfonto superis 100 milionojn da usonaj dolaroj. Ĉi-rilate la kardinalo sciigis, ke kontribuis al tiu rezulto eksterordinaraj donacoj, kiuj eble en la kuranta jaro ne ripetiĝos. La realan enspezon de tiu monfonto – kalkulitan en usonaj dolaroj – krome negative influas la daŭre falanta kurzo de la dolaro.

Kiuj katolikaj komunumoj plej kontribuis al la papaj bonfaraj iniciatoj? La

usona (malgraŭ, diris la informanto, la bedaŭrinda kaj honta afero de la pederastaj pastroj), la germana kaj la itala fidelularo, se oni konsideras la monsumojn. Se eblus kalkuli laŭ la nombro de katolikoj de unuopaj landoj, eble

la rezultoj montriĝus malsamaj, ĉar ankaŭ fideluloj de aliaj kontinentoj eksentas la devon kontribui. Tamen multaj donacantoj ne lasas indikon pri sia origino.

Armando ZECCHIN



TERMINA GOSCAR



## EŬROPA UNIO

## La eŭrobiletoj en Belgio

**Volontula grupo observas la cirkuladon de la eŭrobiletoj tra Eŭropo. Per la registraĵoj eblas fari diversajn statistikojn.**

**L**aŭ la TTT-ejo *Eurobilltracker* ([www.eurobilltracker.com](http://www.eurobilltracker.com)), multlingva, ankaŭ en Esperanto, fondita en 2002 por observi la movojn de la eŭrobiletoj en la Eŭropa Unio, komence de julio 2007 nur 17,3 % de la eŭrobiletoj, kiuj cirkulas en Belgio, estas ankaŭ efektive presitaj tie, do vere belgaj.

Ekde la enkonduko de la eŭro antaŭ kvin jaroj la procentaĵo konstante malaltiĝis. En januaro 2002 ankoraŭ pli ol 80 % de la biletoj estis belgaj. Unu jaron poste tiu procentaĵo jam falis al 50 %. Laŭ *Eurobilltracker* la procentaĵo de hispanaj biletoj nun estas preskaŭ same granda kiel la procentaĵo de belgaj biletoj: 16,5 %. Krom tiuj, ofte cirkulas ankoraŭ germanaj (15,9 %), francaj (13,4 %), italaj (10,2 %) kaj finnaj (8,1 %) biletoj. Malpli aperas aŭstraj (3,1 %), irlandaj (1,0 %) kaj grekaj (0,8

%). Tiu diferenco ŝajne rilatas al la pli granda geografia kaj kultura distanco inter la landoj.

La koncerna TTT-ejo permesas al membroj registri la biletojn, kiujn ili posedas, kaj ankaŭ kontroli, en kiuj landoj, eĉ en kiuj urboj, tiuj biletoj jam uziĝis. La vagado estas ilustrata per mapoj. Iu fanatika uzanto jam registris pli ol 400 000 biletojn. Eble post vojaĝo tra la tuta mondo iam la sama bileto revenos al la sama persono.

Lode VAN DE VELDE

## ALBANIO

## Kiam enmigras mono

**E**n multaj landoj turismo kaj komerco vivtenas la ekonomion. En Albanio, tamen, tion faras la mono de elmigrintoj. Ĉirkaŭ 1,5 milionoj da albanoj loĝas precipe en Grekio kaj Italio kaj jare sendas hejmen 934 milionojn da eŭroj. Tio konsistigas 13 % de la malneta enlanda produkto.

Ĉirkaŭ 26 % de la albanaj familioj dependas de membroj eksterlande laborantaj. Kalkulte estas, ke dum la lastaj 15 jaroj la elmigrintoj sendis entute 6,3 miliardojn da eŭroj. La mono konvertiĝis ne nur en nutaĵojn kaj vestaĵojn, sed ankaŭ en novajn hejmojn kaj produktaĵojn. Ĝi fariĝis ankaŭ ŝparmono en bankoj.

Laŭ la Internacia Migrada Organizaĵo (IMO), elmigrinto-mono superas je 65 % tiun de komerco kaj je 132 % tiun de turismo. Denove laŭ IMO, albanaj elmigrintoj enviciĝas la

unuaj inter elmigrintoj de 20 aliaj landoj, kiam temas pri sendado hejmen de sia mono. Malbona, tamen, estas

tio, ke la mono cirkulas plejparte ekster bankoj, kio malhelpas la ekonomion.

Bardhyl SELIMI

*Ĉirkaŭ 26 % de la albanaj familioj dependas de membroj eksterlande laborantaj.*



# Canaletto: Imponaj pentraĵoj de eŭropaj urbvidaĵoj

**P**er la organizo de pentraĵ-ekspozicio de la italo Bernardo Bellotto (ĉ. 1721-1780), iufoje nomata Canaletto [kanaletto], la Arthistoria Muzeo en Vieno plenumis sian multjaran deziron ebligi la aliron de vasta publiko al la artaĵoj de tiu fama pentristo, kiu en ili eternigis vidindajn lokojn de vico da eŭropaj urboj.

Vigla kunlaboro de la viena muzeo kun la plej gravaj polaj muzeoj estigis la fundamenton de tiu ekspozicio. Pro la restaŭrado de la Reĝpalaco en Varsovio kaj ties „Canaletto-Halo” gravaj pentraĵoj de la pola ciklo de Canaletto – kiuj tie estas konstante ekspoziciataj – povis veni al Vieno. Tie ili estis montrataj kune kun pentraĵoj el la Nacia Muzeo de Varsovio kaj el aliaj eŭropaj kaj ekster-eŭropaj kolektoj, nome el Sankt-Peterburgo, Dreseno, Budapeŝto, Dublino, Londono, Milano, Torino, Vaŝingtono, Vieno, samkiel el privataj kolektoj.

La ekspozicio de Canaletto en Vieno prezentis la vivovojon de la pentristo el Italio tra Dreseno, Vieno, Munkeno kaj Varsovio surbaze de liaj impresaj pentraĵoj, kreitaj en la menciitaj urboj.

Bernardo Bellotto, kiu naskiĝis en Venecio ĉirkaŭ 1721, estas unu el ►



*Verona, Ponte delle Navi, ĉ. 1746-1747. Varsovio, ŝtata muzeo.*



*Dreseno vidita de la dekstra bordo de la rivero Elbo el la jaroj 1751-1753. Dreseno, ŝtataj artkolektoj, galerio de malnovaj majstroj.*



Vieno, dominikana preĝejo, 1759-1760. Vieno, arthistoria muzeo.



Varsovio, strato Długa, 1777, Varsovio, reĝa palaco.



Kontribuojn por la rubriko **Arto de MONATO**  
kunlaborantoj sendu al [arto@monato.net](mailto:arto@monato.net).

► la ĉefaj reprezentantoj de la tiel nomata *panoram-pentrado*, la ĝenro de kvazaŭ topografie ĝusta redono de urbaj vidaĵoj. Tiu specifa formo de pentrado de urbaj pejzaĝoj evoluis en Venecio dum la 18a jarcento lige kun la pliiĝanta nombro de vojaĝantoj cele al memkleriĝo. Ĉefmajstro de tiu specifa ĝenro, ekestinta ĝuste en Venecio, estis Antonio Canale [kanale], onklo kaj instruanto de Bellotto, kiu de li transprenis la alnomon Canaletto.

Bellotto aktivis post siaj lernojaroj ĉe Antonio Canale ankaŭ ekster Venecio, en Romo, Florenco, Lucca, Milano, Torino kaj Verono. En 1747 li forlasis sian naskiĝurbon Venecio por ĉiam kaj transloĝiĝis al Dresdeno en sud-orienta Germanio. En la sekvaj 11 jaroj li pentris tie kiel kortega pentristo ĉe princo-elektisto Frederiko Aŭgusto la 2a vicon da grandaj pejzaĝ-pentraĵoj de la floranta malfrubaroka rezidentej-urbo Dresdeno, samkiel de la

mez-epoka urbo Pirna kaj ties fortikaĵo. Per tiuj pentraĵoj li transdonis la ĝis tiam specifan venecian formon de urbvidaĵa pentrado al meza Eŭropo. Liaj pentraĵoj mirigas per la topografia ekzakteco kaj detal-fidiindeco, kvankam Canaletto faris gravajn ŝanĝojn favore al la kohereco de komponaĵa konstruo kaj efike dividis la komponaĵojn per fortaj lumaj kaj ombraj kontrastoj.

En 1759 kaj 1760 la pentristo restadis en Vieno, kie li, komisie de la aŭstra-hungara imperiestrino Maria Tereza, kreis pentraĵojn de vidaĵoj de Vieno kaj de la imperiestraj kasteloj Schönbrunn kaj Schloss Hof, kiuj estas konstantaj ekspoziciaĵoj de la Arthistoria Muzeo en Vieno.

Poste Canaletto revenis tra Munkeno al Dresdeno, kaj ekde 1767 ĝis sia morto en 1780 li estis kortega pentristo ĉe la pola reĝo Stanisław August Poniatowski. Tie li pentris por la reĝa palaco grandan nombron da pejzaĝ-pentraĵoj de Varsovio kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

Evgenij GEORGIEV

OPERO

# Kantado en la gaela lingvo

**T**uj post la fino de miaj lernejaj jaroj, mi provizore laboris en kelkaj mallongtempaj postenoj. Unu el la plej interesaj – sed ne tre profitodona – estis aĉetado de antikvaj gramofondiskoj, kiujn mi poste sendis al Usono, kie ili estis venditaj al kolektantoj. Temis pri diskoj de operaj arioj kantitaj de la plej famaj kantistoj: Caruso [karuzo], Galli-Curci [galli-kurĉi], Ĉaliapin, Supervia ktp. Por trovi tiajn muzikajn antikvaĵojn, mi devis multe vojaĝi en Portugalio kaj Hispanio, serĉante ilin en brokantejoj kaj en privataj domoj. Dum tiuj vojaĝoj mi havis diversajn agrablajn spertojn, inkluzive de renkontiĝo kun du maljunaj sinjorinoj, kiuj iam estis honordamoj en la kortego de la reĝino de Hispanio.

La teksto de la arioj estis en diversaj lingvoj: itala (kompreneble la plej ofta), franca, germana kaj rusa. Tre malmultaj estis en malpli disvastiĝintaj idiomoj. Por legi la etiketojn sur la rusaj diskoj mi devis lerni la cirilan alfabeton. Informojn pri la komponaĵoj kaj la kantistoj mi trovis en referenclibroj pri la historio de opero. Ĉar mia hejma lingvo estas la gaela, mi serĉis en tiuj libroj kaj katalogoj por konstati, ĉu la libreto de iu ajn opero iam estis verkita en ĝi. Nur unu mi trovis – irlanda verko, ►

## An opara air creagan Hiort



*La opero inkludas spektaklan kaj sensacian „baleton”.  
An opara air creagan Hiort, la opero sur la klifoj de sankta Kilda.*



► kies titolon mi tute forgesis. Tamen en la *Enciklopedio de Irlando* mi legas, ke la teatraĵoj jam prezentitaj en la gaellingva teatro *Taibhdhearc na Gaillimhe* [tajvjarak na gajljive] en la okcident-irlanda urbo Galway [golŭej] inkludis operojn, sed ĉu estis originalaj, ĉu tradukitaj, ne estas indikite.

Ĝis nun, laŭ mia scio, neniam estis komponita aŭ prezentita gaellingva opero en Skotlando. Antaŭ la dua mondmilito estis verkita muzika teatraĵo en la gaela, sed ne temis pri vera opero, kaj mi ne scias, ĉu la publiko iam spektis kaj aŭdis ĝin. Lastatempe, tamen, la radio kaj la gaela gazetaro raportis, ke entuziasmoj pri opero nun havos okazon ĝui novan operon en la skotgaela. Ĝia titolo estas *Hiort – Mac Talla nan Eun* (Sankta Kilda – eĥo de la birdoj). La opero temas pri la plej fora kaj plej soleca insulo de Skotlando – angle nomata Saint Kilda, kaj gaele Hiort [hiršt]. Tiu insulo – aŭ pli ĝuste insularo – situas je ĉirkaŭ 100 kilometroj de la ekstrema okcidenta marbordo de Skotlando. Dum du mil jaroj la plej granda insulo de tiu grupo estis loĝata, sed en la jaro 1930 la insulanoj timis morton pro malsato kaj ege malvolonte akceptis la decidon forlasi sian antikvegan hejmon. Ĝis tiam ĉiam restis sufiĉe da servokapablaj viroj por ekipi siajn malgrandajn remboatojn kaj por ĉasi kaj kapti la marbirdojn, kiuj estis ilia plej grava fonto de nutraĵo.

La viroj kutimis malleviĝi per ŝnuroj laŭ la krutegaj kvarcentmetraj klifoj, por mortigi birdojn kaj kolekti iliajn ovojn. Ĉar tiu danĝera laboro estis tiom grava por la ekzisto de la insulanoj, junaj viroj ne rajtis edziĝi antaŭ ol montri siajn kuraĝon kaj reziston al vertiĝo, starante sur alta roko super la maro, ĉe la rando de la klifoj.

Por simboli tian pendadon sur la klifoj, la opero inkludas spektaklan kaj sensacian „baleton” en kiuj viraj dancistoj balanciĝas sur ŝnuroj super la scenejo.

Oni intencas prezenti la gaelan operon ne nur en Skotlando, sed ankaŭ en Aŭstrio, Belgio, Francio kaj Germanio.

Garbhan MACAOIDH

## Kotizoj estos adaptitaj

En januaro 2008 la kotizoj de Monato devos esti adaptitaj, pro la ĉiam altiĝantaj paper- kaj afranko-kostoj. Tamen, se vi pagas vian kotizon, tiel ke ĝi atingas la eldonejon aŭ unu el niaj perantoj antaŭ la 1a de novembro 2007, vi rajtas pagi laŭ la malnova kotizo, kiun vi trovos en paĝo 4 de tiu ĉi numero. Do kaptu la okazon por ŝpari monon!

La eldonejo

P.S. Ĉu vi ŝatus ŝpari eĉ pli da mono? Tiam pagu tuj por pli da jaroj. Tiam vi estas certa, ke dum ĉiuj tiuj jaroj vi ĝuos la malnovan tarifon!

# La dika Krause? ... kreditu min, sinjorino!

## Ŭaŭ-sento!

Kiam, antaŭ kelkaj semajnoj, mi vidis la novan dikan Krause, mia unua impresio estis iu ŭaŭ-sento. Jes, malgraŭ mia aĝo, mi sekvas la modernan lingvouzon, la modernan fluon de impresoj, sentoj kaj esprimoj. Kaj certe la dek-kvina regulo permesas al ni enkonduki la vorton. Ŭaŭ! Du mil ducent dudek kvin gramojn! (La antaŭulo: 650 gramojn.) Ŭaŭ! Mil sescent sepdek naŭ paĝojn (la antaŭulo: 591). Ŭaŭ! En ĉiu paĝo kvarcent ok kvadratacentimetrojn (la antaŭulo: 228 cm<sup>2</sup>; rilato do: 1,8). Ŭaŭ! Bela bindo! Deca koloro, kvankam la flavo de *Langenscheidt* pli plaĉis al mi, kaj ankaŭ la pli simpla difektilo de la antaŭulo havas mian preferon, sed ... pri gustoj kaj koloroj ... Sur la dorso mi legis jubilan deklaron, ke temas pri la tutmonde plej ampleksa dulingva Esperanto-vortaro iam ajn aperinta. Nu, bone, libro-dorso rajtas esti, aŭ devas esti, varba. Tiu aserto, tamen, aplombe ripetiĝas en la antaŭparolo kaj tiel, vole-nevole, invitas al pli funda esploro.

## Huj-sento

En la frato (Esperanto-germana, eld. Buske, 1999) treege ĝenis min (mi ne disponas pri ŝaltilo por malfunkciigi mian estetikan sentemon), ke la esperantaj supersignitaj literoj, en sia oblikva formo, tipografio ne harmonie dancis kun la sensupersignitaj. Ili ĉiam tro proksimis, tretis la aliajn sur la piedfingrojn. En la nuna komputila tempo ripari tion ja ne devus esti tia nesolvebla problemo! Feliĉe, la oblikvaj esperantaj tekstoj en la nova eldono estas maloftaj; ili aperas nur en la bibliografiaj indikoj, sed la problemo ne estas solvita. Plie, la eldonisto, ŝajne, havas

romofobion, ĉar li komencas numerigon nur ĉe X kaj forgesas indiki XII kaj XV. Negrave, sed ŝoke en prestiĝa libro! Tamen mi rapide aldonu: tio ne detenu vin de aĉetado! Cetere, ĉe la redaktado oni uzis la eksterordinarajn avantaĝojn de perkomputila paĝordigo. Tiel oni, ekzemple, evitis perdon de spaco, ĉar ĉiu litero finiĝas ĉe la lasta linio de paĝo, kaj do ĉiu nova litero komenciĝas tute supre de paĝo, kaj inter du sinsekvaj literoj neniu gapa vakuo restas. (Nur la nederlanda vortaro tion antaŭe faris, eĉ iom pli fajne ankoraŭ, ĉar tie ĉiu nova litero komenciĝas en dekstra paĝo.)

## Pomoj kaj citronoj

Estas malfacile kompari pomojn kun citronoj. Eĉ jam komparo kun la antaŭulo (por mi la *Langenscheidt*-eldono de 1993) ne estas tiel facila. Unuavide, oni pensus, ke oni komparas giganton kun nano (nu, tamen jam plenkreska nano). Sed, iom pli detale rigardante, oni konstatas, ke la enhavo de unu malnova paĝo superas la enhavon de unu nova! La nova havas 53 liniojn en ĉiu paĝo, la malnova – malgraŭ malpli granda formato – havas 62 liniojn. Ankaŭ la litertipo estas nun multe pli granda ol antaŭe. Granda avantaĝo – sed vi devas pripaigi ĝin – estas plia komforto por legado, por uzado. Oni do certe ne trovas la rilaton de pliampleksiĝo per kalkulado de la rilato de nombroj de paĝoj (2225 : 650 = 3,4). Mi elektis serion de 100 kapvortoj en la malnova (de *Katze* ĝis *Keimdrüsen*) kaj nombris, kiom da kapvortoj aperas en la nova inter tiuj du limvortoj. Rezulto: 167. Vastigkvociento do egalas preskaŭ 1,7. Se mi faras saman kalkulon en mia germana-nederlanda vortaro, tiam, tamen, la nom-



bro estas 268. La vastigo do certe ne atingis sian limon.

## Kien forkuris mia kato?

Iam la frato liveris al mi, malrekte, nederlandan malfacilan ombrigitan vorton. Mi bezonis nederlandan vorton por la esperanta „kavaliero”. Krause instruis al mi, ke germane estas *Katze*, kio kondukis min rekte al la nederlanda ekvivalento por „kato”. Nun mi do volis reviziti mian malnovan amikon ... sed konstatis, ke ĝi mankas. Kaj tio kondukas min al la konstato, ke malforta flanko de la nova dika Krause kuŝas en la troa limigo de la diversaj signifoj de unu sama kapvorto. La vortaro konas nur la katan *Katze*! Malgranda Brockhaus citas 6 signifojn. La hispana *gato*, en la granda vortaro de Fernando de Diego, havas 11 signifojn pure-vortajn kaj 19 esprimojn plus 7 pliajn kombinaĵojn, dum la fama Real citas 17 diversajn. La itala vortaro de Carlo Minnaja donas kvinon da signifoj por *gatto*. Mia germana-nederlanda havas liston de 9 signifoj. En la franca *chat* havas 4 signifojn, la angla *cat* 14. Nu, jes, la plej grava, plej kutima estas *kato*, sed ... mi bezonas vortaron ne por serĉi la signifon de „seĝo” aŭ „tablo” aŭ „domo”, sed precipe por serĉi signifon de vortoj, kiujn mi ne konas, ne komprenas, kiujn mi eble nur unufoje en la vivo renkontos! Mi faris la ►

► saman konstaton por multaj aliaj kapvortoj. Ekzemple *Hand* kun unu sola signifo ĉe Krause, sed 28 por *mano* ĉe de Diego (36 en la Real), 4 ĉe Minnaja por itala *mano*. Plie ankaŭ la esprimoj magras, kompare kun aliaj vortaroj. La nacilingvaj vortaroj al la nederlanda donas por la franca *main* 5 signifojn, kaj por la angla *hand* 13.

### Pri abeletoj kaj floretoj

Atenta uzanto rapide rimarkos, ke abundas la nomoj de kreskaĵoj, de plantoj kaj bestoj. Ĉiam ili abundas pli ol en PIV. Tiel *Ehrenpreis* (veroniko) aperas kun sep specioj, dum en PIV nur du estas troveblaj. Temas do pri neologismoj, sed – en tiu ĉi okazo almenaŭ – ili estas tute normalaj, tute akcepteblaj tradukoj de la latinaj nomoj. Nepre laŭdirinde kaj akceptinde, kaj espereble oni transprenos ilin en novan PIV. Nenio ŝoka. Iom pli tikla jam estas ĉe *tränendes Herz*, „rigardinda dicentro”, sufiĉe fidela traduko de *Dicentra spectabilis* – kvankam diversaj aliaj tradukoj de „spectabilis” estus eblaj – ĉar „dicentro” (iom ĝena karambolo) ne estas PIV-a. Aliflanke, ĝi estas formita laŭ la kutimaj reguloj. Tamen estus dezirinde, ke tiaj neologismoj estu indikitaj kiel neologismoj. Se ne ... kiu verko ja estu norm(ig)a? Se ĉiu nacio havos sian propran norm(ig)an vortaron, kien tio kondukos? Ofte plantoj, kaj bestoj, havas popolajn nomojn,

kaj mirinde ofte oni trovas la saman nomon en Esperanto. Sed esceptoj estas! Tiel nia dicentro havas sufiĉe malsamajn nomojn laŭ la nacia lingvo: sangantaj koretoj; rompitaĵoj koretoj; sonorilaretoj; lirofloretoj; fajra amo; mari-koretoj; ĝanetkoretoj; gutantaj koretoj; terfumo ... kaj, certe, iuj legantoj konas ankoraŭ aliajn nomojn por la sama, tre ŝatata, floreto. Por mi unu sola norma verko sufiĉas ... kaj oni zorgu, ke PIV enhavu kiom eble plej da vortoj. Mi tre dubas, ĉu por ĉiu ornitologo estos klare, ke „brovalaŭdo” nomiĝas *Chersophilus duponti/Dupont-Lerche*. Nu ... eble jes.

### El kunpuŝiĝo de ideoj naskiĝu lumo

Sur la durkovrila frontpaĝo de la vortaro aperas ĝuste vorto, por kiu la diversaj vortaroj havas malsaman solvon (kio ne nepre estas malbona, kondiĉe ke ĉiu estu komprenebla), nome *Eselsohr*, kun, laŭdirinde, tri signifoj. La diskutenda signifo estas tiu de la faldita, aŭ, laŭ mi, pli ankoraŭ ĉifonita, angulo de libropaĝo (de studaŭ alia libro). Krause donas, iom tro anemie, tro priskribe, „faldita angulo de libropaĝo” ... dum la franca vortaro uzas „refaldo”, la angla „korno” (interese, estas la franca vorto, kiu estas *corne*), la nederlanda „angulfaldo”, la itala „refald(aĵ)o”, „kornofaldo”. Fakte do ĉiu el ili estas komprenebla kaj akceptebla, certe, en ĝusta kunteksto.

### Kiu kuraĝe aliras, facile akiras

Ĉiun besteton sian ludeton, ĉiun krokodilon sian ludilon. Mia ludilo estas frazeologio, esprimaro, kaj mi ĉiam esperas malkovri en vortaroj novajn taŭgajn, kompreneblajn, sed sukaĵajn esprimojn. Krome, mi ŝatas rimarki, kiel vortaristo sukcesas ligi (kaj malgraŭ ĉiuj ĉiutagaj insistoj certe ne jam „linki”!) belajn nacilingvajn esprimojn kun ekzistantaj (aŭ ekzistontaj) esperantaj esprimoj. Tiel mi trovis ĉe Krause: *er will mit dem Kopf durch die Wand* – „por lia volo ne ekzistas mal-molo”, sed ĉe *den Kopf in den Sand stecken* mi bedaŭras la mankon de la struto, kiu, tamen, pliklarigus la sencan kaj estas PIV-a. Por *er hat viel hinter sich* tradukita kiel „li travivis multon (malbonan en sia vivo)” estas, tamen, en la zamenhofa proverbaro troveblaj pli ol unu suka ekvivalento! Rimarkinde trafa estas la traktado de *einlegen*, kiu montras dekon da diversaj esperantaj vortoj laŭ la senco. *Mit ihm ist nichts anzufangen* iĝas laŭ la germana signifo *er taugt zu nichts* – „li taŭgas por nenio”, dum Zamenhof bilde kaj bele predikis: „li taŭgas nek por studo, nek por ludo” kaj eble ankaŭ „nek por baki, nek por haki”. Enigmo estis por mi kaj restas por mi: *die holde Weiblichkeit*, ĉar post ĝi mi trovas nur nekompreneblan (por mi) *kaum Hawa*. Ĉu slango?

### Konklude

Havinda verko, malgraŭ ĝia, tamen, tro alta nelogika prezo. Duono estus certe pli logika, se oni komparas kun similaj verkoj. Kaj ... ĝi absolute estas malpli vasta, malpli kvalita ol la hispana de Fernando de Diego kaj la itala de Carlo Minnaja! Tamen bona verko, valoro verko, kvankam nepre plibonigenda! Ni fiere montru ĝin al la ekstera mondo kaj dece prisilentu ĝiajn mankojn.

Petro DESMET'


Erich-Dieter Krause: *Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto*. Eld. Helmut Buske Verlag, Hamburg, 2007. 1679 paĝoj. ISBN 978-3-87548-466-3.

Prezo ĉe FEL: 128 eŭroj + afranko.

## La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,

Frankrijklei 140,  
B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Tlf. + 32 3 234 34 00; tlk. + 32 3 233 54 33;

rete: [retbutiko@retbutiko.net](mailto:retbutiko@retbutiko.net);  
skajpe [fel-monato](https://www.skype.com/partners/fel-monato)  
aŭ per [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net).



# Tri fuĝantoj

**T**eruraj kaj sovaĝaj fariĝas homoj en ekstremo. Ŝoka estas la rakonto de la kontrolisto de la japanaj militkaptitoj.

„Kial ni ne forkuru? Nia malamiko neniam lasos nin hejmen iri, pro manko de laboristoj,” proponis unu kaptito.

„Nia hejmo tamen estas tro malproksima, eble pli ol kvar mil kilometrojn for,” kontraŭparolis alia. „Multaj arbaregoj, riveregoj, kaj eble montoj staras antaŭ ni.”

Kvankam la milito finiĝis jam de longe per malvenko de Japanio, nenia informo pri la hejmeniro de militkaptitoj estis aŭdebla. Kaptitoj fariĝis pli kaj pli malesperaj. Ne mirinde, ke la ideo pri forkuro eliĝis. Sed aktuala agado estis tro malprudenta kaj danĝera. Vere la kazerno ne estis ŝlosita. La kaptitoj estis konsiderinde liberaj. La gardistoj estis eĉ amikaj al la kaptitoj. La loĝantoj ĉirkaŭ la kazerno ankaŭ estis bonkoraj, kaj de tempo al tempo proponis akvon al la kaptitoj post peza laboro. La gardistoj komplicis pri tio, ĉar ili eĉ trinkis la samon kune. Ne regis severa malsato, kvankam la manĝoracio ne estis sufiĉa. Sed la sopiro al hejmo nature plimultiĝis post la laboro ĉiutaga, precipe pro manko de informoj el la ekstera mondo. Multfoje interkonsiliĝis la du kaptitoj pri la ebleco forkuri. Vere ŝajnis facila la forkuro. Sed ĉu oni povas alveni al sia hejmo kvar mil kilometrojn for? Oni ne povas uzi fervojon, kiu estas sub severa kontrolo de la armeo.

„Nu, ni piediru. Ni povos trovi manĝaĵon survoje. Kion ajn bestoj povas fari, tion homoj ankaŭ faru! Post kelkaj monatoj, ni atingos la maron, kie ni ŝtelu boaton!”

Unu tagon tri kaptitoj forkuris. La kontrolisto malkovris la foreston de la

kaptitoj post kelkaj horoj. Taskeskadro de ĉasarmeo estis tuj organizita. La eskadro havis veturilojn, ĉevalojn kaj eĉ maŝinpaŝilojn.

„La fuĝantoj ne povas iri malproksime. La vojoj estas nefacilaj kaj tre limigitaj, nur unu aŭ du elektoj, entute,” diris la ĉefoficiro, decidema kaj trankvila.

Li ja estis prava, ĉar jam antaŭ la noktomezo de la sekvanta tago, la ĉasarmeo revenis kun la rekaptitoj. Jes, rekaptitoj. Sed la fuĝintoj nun estis senvivaj sub jutaj kovriloj.

„Kio ja okazis? Ĉu vi pafis ilin al morto?” mi demandis timeme de la ĉefoficiro.



# Islanda historia romano

*Sagao de Njal* apartenas al la t.n. *Islandanaj Sagaoj*, verkitaj de nekonataj aŭtoroj en la 13-a jarcento. La sagaoj estas prozaj rakontoj pri eventoj okazantaj ekde la fino de la 9-a jarcento ĝis la komenco de la 11-a. Tiuj eventoj havas historian bazon, sed la aŭtoroj pritraktis la temon artisme, tiel ke oni povas rigardi la sagaojn kiel historiajn romanojn, tamen realismajn.

*Sagao de Njal* estas la plej granda kaj artisma el la sagaoj. Malgraŭ vasta personaro kaj komplika eventaro ĝi formas arte kunplektitan tutajon; oni havas la impreson, ke ĝia aŭtoro havis enmense ĝian lastan vorton jam en la komenca ĉapitro. Konfliktoj, venĝoj, repaciĝoj viciĝas en drameca sinsekvo ĝis la definitiva solviĝo en la fino.

Personecoj atestas pri si mem per vortoj kaj faroj, neniam estas dirite, kion ili pensas.

La sagao estas tradukita jam en multajn lingvojn. Laŭ internacia enketo inter eminentaj verkistoj lastjare *Sagao de Njal* estis elektita kiel unu el la cent plej bonaj verkoj de la monda fikcia literaturo.



Paĝoj: 357; ilustrita; 21 cm; kudre bindita; 2003;

Prezo: € 18,00


Informoj:

tlf. +32 3 234 34 00;

tlk. +32 3 233 54 33;

rete: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)

<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

► „Jes, ni mortigis du el ili,” respondis la oficiro mallaŭte kaj diris nenion pli.

La nombro de la kadavroj estis tri. Tamen la ĉasarmeo mortigis nur du. Kion signifas tio? Ĉiuj estis mutaj. Eĉ la soldatoj, ordinare gajaj, volis paroli nek al ni nek inter si. Kaj ili ŝajnis tre malĝojaj, kvankam ilia tasko estis sukcese plenumita. Post unu tago, la oficiro iom post iom rakontis al mi pri la okazaĵo. La ĉasantoj facile trovis la fuĝantojn en frua nokto apud klare videbla fajro. Du viroj bruligis ion per lignetoj. La bruligita estis tranĉita karno de homa korpo! La du fuĝantoj kriegis nehoman krion kaj senespe-re kontraŭatakis la ĉasantojn por tuja mortigo per pafiloj. La forkurantoj estis tro optimismaj. Ili ne konis la realan severecon de la vasta Siberio. Preskaŭ nenion manĝeblan ili povis trovi dum taglonga kurado. Ĉevespere de la sekvanta tago, eble malsato fariĝis netolerebla. La plej malforta fariĝis viktimo. Iom kompatindaj estis la du pli fortaj, kiuj estis pafitaj, antaŭ ol ili satigis sian apetiton. La viktimo tamen estis venĝita!

„Ĉu vi, japanoj sovaĝuloj, manĝas homan karnon?” demandis severe de mi la oficiro.

Regis tomba silento inter ni. Mi rememoras la diron de mia amiko pri kankroj. En infaneco, li kaptis naŭ kankrojn kaj forlasis ilin longe en kesto. Li trovis post kelkaj tagoj nur du gigantajn kankrojn en la kesto. Sendube la kankroj manĝis unu la alian, ĝis la fina grandiĝo de du postvivantoj. Mi plue rememoras la rakonton pri postvivantoj sur savboato, kiuj decidis loti pri manĝviktimo. Simila tragedio okazis inter niaj kolegoj. Homo certe estas malforta, jes, precipe malforta kontraŭ malsato. Vere nur post malpli ol du tagoj la forkurantoj alvenis al tia ekstremo! Mi ne volis tion kredi. Sed kiel mi povus kondamni ilin? Dio scias, kion mi farus en simila situacio. Ĉiuokaze nia hejmlando estis senespere for je kvar mil kilometroj!

Post tri monatoj, neatendite venis al ni bela novaĵo: – Ni povas iri hejmen laŭ akordo internacia.

Eizo OTSUKA

## ANONCETOJ

**AIS San-Marino** raportas pri sia konferenco SUS 30: [www.ais-sanmarino.org](http://www.ais-sanmarino.org).

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego, programa dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete [www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de).

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nu-distoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adre-so: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: [jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com).

**Esperanto-instruistoj:** vizitu [www.edukado.net](http://www.edukado.net). Ĉio de vi por vi!

**Esperantistaj foto- kaj filmamatoroj,** vizitu [www.ipernity.com](http://www.ipernity.com).

**Kreu vian propran librokatalogon!** Per la Retbutiko [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net)!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro\* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj\*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al [http://www.esperanto.be/fel/mon/mon\\_anon.php](http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php).

\*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0255-6587

# LA GAZETO

## MONDKULTURA SENDEPENDA ESPERANTISMA

PETU PROVNUMERON ĈE  
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

[gazeto@aol.com](mailto:gazeto@aol.com)

<http://www.lagazeto.com>

## La KancerKliniko

**Politika Kultura Skandalema Ajnista**  
**4 numeroj jare + La Krom**

**REGULAJ KUNLABORANTOJ:** Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)  
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris  
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp  
[ikk@free.fr](mailto:ikk@free.fr)

## La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR  
30 USD  
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

**SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO**



**La plej nova novelaro de Lena Karpunina**

# Neokazinta amo

**kun 15 novaj rakontoj, inter kiuj kelkaj estis premiitaj.**



## **Legintoj skribas:**

“Se mi estus leginta nur unu rakonton de Lena Karpunina, mi povus konvinke aserti: la juna verkistino estas vere talenta. En stilo klara, laŭ bona tradicio de la rusa literaturo, la rakontoj pliriĉigas niajn mensojn, plibonigas niajn korojn.”



(Ignat Florian Bociort)

“Ŝia majstra talento verkista konsistas ĉefe el homa psikologio kaj kapablo prezenti eĉ la plej strangajn personojn tiel, ke la leganto akceptas kaj eĉ ekŝatas ilin. En la Esperanta literaturo tiu ŝia talento estas vere malofta.”



(Sten Johansson)

**Prezo: 15 eŭroj + afranko**

**Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendanto.**

- ISBN: 90-77066-28-7
- Paĝoj: 150
- Serio Stafeto n-ro: 31

**Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.**  
**Rete: [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) - [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)**